

STOCKHOLMS UNIVERSITET  
Institutionen för lingvistik  
Esperanto I  
Realia, 5 hp

## **Slango Universala?**

Esploro pri la universaleco de Esperantaj slangaj esprimoj

*Olof Pettersson*

## **Resumo**

La artikolo temas pri esplorado de la universaleco de slangaj esprimoj kaj idiomoj en Esperanto. Mi hazarde elektis 50 vortojn el la vortaro *Slango kaj ĵargono* de W.F. Pilger, kaj provis trovi sufiĉe similajn korespondajn esprimojn en la sveda kaj la angla per diversaj slango- kaj idiomovortaroj kaj la Interreto.

Por la 50 hazarde elektitaj esprimoj, mi trovis 35 – laŭ mi – sufiĉe similajn korespondaĵojn kaj 10 ankoraŭ pliajn esprimojn, kiu – laŭ mi – estas sufiĉe memkompreneblaj en la ĝusta kunteksto.

Tiu rezulto aludas ke la plejmulto de slangaj esprimoj kiuj ekzistas en Esperanto ankaŭ ekzistas en aliaj lingvoj, kaj tial povus esti rigardataj kiel universalaj en iu senco. Tamen la esplorado nur temas pri la sveda kaj angla, plua esplorado, uzanta aliajn lingvojn – prefere iun latinidan kaj iun slavan lingvojn – estus necesa por pli certa rezulto.

## **Enhavo**

<b>Enkonduko.....</b>	<b>4</b>
<b>Celo.....</b>	<b>4</b>
<b>Metodo kaj materialo.....</b>	<b>4</b>
Tabelo 1: Elektitaj vortoj.....	4
<b>Observoj.....</b>	<b>7</b>
<b>Diskuto kaj konkludoj .....</b>	<b>7</b>
<b>Referencoj.....</b>	<b>8</b>

## Enkonduko

Tiu ĉi artikolo temas pri esplorado de le "universaleco" de slangaj esprimoj kaj idiomoj en Esperanto. Mi havis la ideon pro Benson (1995, pp 4–5), kiu skribis

There is some temptation to translate slang expressions literally, but the cultural allusions so common in slang are by no means universally understood. This is not to say that Esperanto cannot or should not contain flowery or slangy language; quite the contrary. However, one should consider whether one's hearer will understand the allusion of an English slang or colloquial expression used in literal translation in Esperanto, assuming that the hearer knows only the formal applications for the words in question.

Tial, mi volas esplori ĉu (almenaŭ la plejmulto de) slangaj esprimoj kaj idiomoj en Esperanto en iu senco estas universalaj. Tion mi provos atingi per ekzameni kelkajn slangajn esprimojn kaj serĉi respondajn esprimojn en la angla kaj la sveda lingvo.

## Celo

La celo de tiu ĉi esplorado estas trovi ĉu kutimaj, disvastigitaj slangaj esprimoj kaj idiomoj en Esperanto estas "universalaj", en la senco ke la plejmulto de la esprimoj havas sufiĉe similajn korespondadojn en aliaj lingvoj. Ĉar mi plej bone regas la svedan kaj la anglan, kaj tiu ĉi nur estas malgranda esplorado, mi nur serĉos korespondajn esprimojn en tiuj lingvoj.

## Metodo kaj materialo

Mi uzis la vortaron *Slango kaj jargono en Esperanto* de Pilger (1996) kaj hazarde (per du ĵetkuboj) elektis 50 radikojn, 25 el la komenco (diversaj radikoj de A ĝis D) kaj 25 el la fino (R ĝis Z). Tie, kie la vortaro nur montris al alia, rilata vorto aŭ esprimo, mi anstataŭe elektis la montritan esprimon. Mi serĉis korespondajn anglajn esprimojn en *Amerikanskt slanglexikon* de Heckscher (1997), *Cambridge International Dictionary of Idioms* (1998), la reta serĉilo *Google*, kaj la TTT-ejo *Urban Dictionary*. Por la svedaj esprimoj, mi uzis ĉefe miajn proprajn sciojn pri la sveda, kaj la serĉilon *Google*.

La elektitaj vortoj estas en *Tabelo 1* sube. La blankaj linioj estas esprimoj kiuj havas (laŭ mi) similajn korespondadojn en la angla kaj la sveda. La helgrizaj linioj estas esprimoj por kiuj mi ne trovis sufiĉe similajn korespondajn esprimojn, sed kiuj (denove, laŭ mi) estas sufiĉe memkompreneblaj en la ĝusta kunteksto. Por la esprimoj kun griza ĉeloj en la sveda kaj angla kolono, mi ne trovis korespondadojn.

*Tabelo 1: Elektitaj vortoj*

Radiko	Esprimo	Signifo	Sveda	Angla
<b>aero</b>	Aerumi sian cerbon	fari, por distri sin, ion ne tiel intelektan	Lufta hjärnan, rensa hjärnan	Clear one's head
<b>akustiko</b>	Mi ne ŝatas la akustikon ĉi tie	Estas homoj en la ĉirkaŭo, kiuj prefere ne aŭdu	Väggarna har öron här, det är för många öron här	The walls have ears
<b>alineo</b>	Li paŭzis meze de alineo	Peco de paroloaĵo	Pausa mitt i en mening	Pause mid-sentence
<b>amebo</b>	amebo	malgrava persono	amöba	amoeba

<b>anatomio</b>	Li interesigās ĉefe pri ŝia anatomio	la korpo		
<b>angilo</b> → <i>glata persono</i>	Glata persono	Elturniĝema, nekonsekvenca, nefindinda (homo)	Hal typ, hal som en ål	Be as slippery as an eel
<b>ant</b>	...anto	pri (ne tiel bona) ...isto, ekz. verkanto		
<b>apetito</b>	apetitiga	agrabla, invita laŭ ekstera aspekto	aptitretande, lockande	apetizing
<b>aranĝi</b>	aranĝi	organizi laŭ ne tute oficiala vojo	ordna, fixa	arrange
<b>arĥivo</b>	ronda arĥivo!	Paperkorbo, rubujo	Det runda arkivet	The round archive
<b>aŭdi</b>	disaŭdigi	Peti diversajn personojn, atenti ĉu ili aŭdos ion pri certa temo.	Höra sig för, be folk hålla örönen öppna	Listen around, listen out for
<b>balai</b>	balailo	1. kruro 2. alta, maldika persono	1. påkar 2. pinnsmal, lång som en stång	1. ? 2. Thin like a broomstick
<b>banko</b>	informobanko	kolekto de iutemaj informoj, ne necese en komputilo, konsultebla de fore.		
<b>bendo</b>	bendilo	Bendo-ludilo	Bandare, bandspelare	Tape player
<b>bildo</b> → <i>pentri</i>	pentri belan bildon	prezenti aferon pli bela ol ĝi estas	måla upp en (vacker/falsk) bild av något	paint a rosy picture of sth
<b>bobelo</b>	bobelaĵo	ŝaŭmvino	bubbel, bubbelvin	bubbly
<b>bonzo</b>	bonzo	(pagata) estrarano (kiu ne venas el la membro-rondoj)		
<b>brajlo</b>	Ĉu mi brajligu tion por vi?	Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas		
<b>bubo</b>	bubo	Knabo, ulo	buspojke, busunge	brat
<b>butero</b>	buteri	Flati, flirti	Smöra för	Butter up
<b>cigaredo</b>	Rulita cigaredo	Memfarita el rultobako kaj papereto	Rullad cigarett	Rolled cigarette
<b>ĉerizo</b> → <i>kerno</i>	Estas kerno en la ĉerizo	Estas neatendita problemoj, komplikaĵo		

<b>danci</b>	Danci laŭ ies muziko	Agi laŭ ies volo	Dansa efter någons pipa	Dance to somebody's tune
<b>delegito</b> → <i>nomo</i>	Nomu ion delegiton	Diru ian ajn nomon, ekz. en anektdoto		
<b>dialekto</b>	En lia dialekto	Laŭ lia speciala vidpunkto, laŭ lia stranga lingvo-uzo	Som han uttryckte det, med hans ord	In his words, as he put it
<b>rezidi</b>	rezidejo	loĝloko	residens	Residence
<b>rozo</b> → <i>okulvitroj</i>	Tra roz(kolor)aj okulvitroj	optimisme	Med/genom rosafärgade glasögon	Through rose-colored glasses
<b>salato</b>	Vidu, kiu salato fariĝis!	Malfavora, problema, konfuza situacio		
<b>selekti</b> → <i>memoro</i>	Selektema memoro	Memori nur aferojn kiuj akordiĝas al la propraj intereso	Selektivt minne	Selective memory
<b>simio</b>	simioharoj	Tabako fajne tranĉita (malbonkvalita)		
<b>sono</b> → <i>promen-sonilo</i>	promen-sonilo	Malgranda, malpeza portebla radio aŭ bendilo kun orel-aŭskultiloj	(bärbar) musikspelare, freestyle, walkman	portable music player, walkman
<b>spino</b>	Li ne havas spinon por tio	[manki] Kuraĝo[n], honesteco[n]	Sakna ryggrad, vara ryggradslös	Spineless
<b>sub</b> → <i>subtitoloj</i>	Subtitolojn, bonvolu!	Klarigu, traduko		
<b>ŝargi</b>	Ŝargi sin	1. Manĝi (rapide, aŭ prepare al energiraba tasko) 2. Drinki	1. Ladda sig, ladda upp 2. Tanka, vara tankad	1. Charge yourself (up) 2. Be tanked up
<b>ŝuo</b>	ŝuvendejo	(En kartludo) kartoj po du de sama speco		
<b>tabelo</b> → <i>kalkultabelo</i>	kalkultabelo	Komputila programo por kalkuli	kalkylprogram	spreadsheet (program)
<b>tamburo</b>	tamburi	Laŭte diskonigi sian opinion	Trumma ut	Drum [into sb]
<b>teksto</b>	tekstotraktilo	Komputila programo por tekstotraktado	textredigerings-program, ordbehandlare	text editor, word processor
<b>telero</b>	telero	Telerforma anteno	paraboltallrik	TV dish, satellite dish

<b>tiel</b>	(ekz.) Tiel la pilko resaltas	Jen la naturo de la aferoj, tia estas fato	(Så går det, sånt är livet)	That's the way the ball bounces
<b>tondi</b>	distondita, ekz. distonditaj rimarkoj	freneza		
<b>troti</b>	Trotu la trotuaron! Batu la brikojn!	Foriru!	Traska iväg! Gå iväg!	Beat the bricks!
<b>ungo</b>	ungoj	fingro	klor	claws
<b>varo</b> → <i>kupono</i>	Kupono ne estas varo	Havi rajton pri io ne sufiĉas, oni devas realigi sian rajton		
<b>velo</b>	velo	Iu kiu sekvas opiniojn de aliaj homoj	(Någon som vänder kappan efter vinden)	(turn-coat)
<b>verda</b>	verda	Ne tre sperta	grön	green
<b>vestiblo</b>	lavi la vestiblon	Pisi (pri virino)		
<b>vidvo</b>	vidvino	(tipografio) komenca linio de alineo kiel lasta linio sur paĝo	enkel horunge, änka	widow
<b>vosto</b>	vosto	La fina parto de io	ände	end, tail end
<b>Zamenhof</b>	zamenhofe, ekz. Ni iom drinkis, zamenhofe	Post (intence) uzita arĥaismo		

## Observoj

El la 50 laŭhazarde elektitaj Esperantaj esprimoj, 35 havas – laŭ mi – sufiĉe similajn korespondaĵojn en la sveda kaj la angla, kaj 11 pliaj esprimoj el ili estas – denove, laŭ mi – sufiĉe memkompreneblaj aŭ almenaŭ ne tro strangaj por kompreni en la ĝusta kunteksto. Nur por 4 el la esprimoj, mi ne trovis bonajn tradukojn aŭ korespondajn esprimojn.

## Diskuto kaj konkludoj

La rezulto, ke 35 el 50 laŭhazarde elektitaj esprimoj havas similajn korespondaĵojn en la sveda kaj la angla, kaj 11 el la restantaj 15 esprimoj (almenaŭ laŭ mi) estas sufiĉe memkompreneblaj en la ĝusta kunteksto, aludas ke la plejmulto de slangaj esprimoj en Esperanto povus esti rigardata kiel universala. Tamen, ĉar mi nur esploris korespondaĵojn en la sveda kaj la angla, tio tute ne estas certa; por tio, oni devus esplori multajn diversajn lingvojn, ne nur "okcidentajn" lingvojn, kaj ne nur ĝermanajn lingvojn kiel la anglan kaj la svedan.

Krom tio, ke mi nur uzis unu fonton por la Esperanta esprimoj, la vortaro de Pilger, eĉ surbaze la sama vortaro, sed uzante 50 aliajn vortojn ol tiuj mi (kvankam laŭhazarde) elektis, la rezulto povus esti iom malsimila. Ankoraŭ alia esplorado, uzante iujn latinidajn kaj slavajn lingvojn ankaŭ povus doni pli certan rezulton.

## **Referencoj**

Benson, Peter J. (1995): *Comprehensive English-Esperanto Dictionary*. Esperanto League for North America. El Cerrito, CA.

Cambridge University Press (1998): *Cambridge International Dictionary of Idioms*. Cambridge University Press, Cambridge.

Heckscher, Einar (1997): *Amerikanskt slanglexikon*. Nordstedts Ordbok. Värnamo.

Pilger, Wouter F. (1996): *Slango kaj ĵargono (en Esperanto)*.  
<http://www.geocities.com/wfpilger/slangou8.htm> [2008-05-13]

*Urban Dictionary*  
<http://www.urbandictionary.com/> [2008-05-25]